

# esperanto.<sup>o</sup> CU

TRIMONATA BULTENO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



## Konsciigo en la praktiko: la 23-a Internacia Librofoiro de Havano

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ



### Intervjuo

Fabio Monteiro,  
Brazilo / 2



### La plej aktiva Esperanto-eldonejo

Kompilis M. Gutiérrez González

Laŭ la rubriko “Laste aperis” de la revuo *Esperanto* de UEA, en la pasinta jaro surmerkatigis 178 libroj kaj broŝuroj (je 25 pli multe ol en 2012). La plej aktiva Esperanto-eldonejo denove estis MAS (Monda Asembleo Socia) de Vilhelmo Lutermano kun 13 volum(et)oj politikaj kaj sociaj, kiujn plejparte li mem tradukis.

Detalaj tabeloj laŭtemaj, laŭeldonejaj, laŭlandaj, kaj klarigoj pri ili troveblas en la tradicia revuo de Aleksander Korĵenkov, *La Ondo de Esperanto*, kiu ekde 1991 ĉiujare aperigas statistikajn resumojn de la libroeldonado en Esperantujo. Lia superrigardo por 2013, publikigita en la februara kajero de *La Ondo de Esperanto*, estas legebla ankaŭ en la novaĵ-retejo *La Balta Ondo*: <http://sezonoj.ru/2014/02/libroj2013/>.



La unua Seminario por Aktivuloj pri Informado “Librofoiro 2014”, alimaniere, SAILFO 2014, okazis la 5-an de februaro en la sidejo de Kuba Esperanto-Asocio kun la celo trejni aktivulojn kiuj deĵorus en la stando de KEA dum la Havana Internacia Librofoiro ekde la 13-a kaj ĝis la 23-a de februaro 2014.

La seminario, kies temo estis *La arto moderne pledi por Esperanto* havis aliajn subtemojn: kiel efike prezenti, informi kaj varbi por Esperanto kaj la praktika uzo de reklamiloj.

La seminarion gvidis Maritza Gutiérrez González, kaj ĝin ĉeestis pli ol 20 havananoj; oni prezentis aŭdvidan materialon kiu konsistis el televida intervjuo farita al KEA-estraranoj ĉe loka televidkanalo por havi ĝeneralan bildon pri tipaj demandoj kutime alfrontataj de la esperantistoj ĉe publikaj sinprezentoj.

Ekestis eta debato kaj sperto-interŝanĝo, klarigoj pri eblaj misinformoj en la ĉiutaga laboro pledi por Esperanto, aktualigo pri la informaga agado kongrue al la nunaj konceptoj starigitaj en la strategia laborplano de UEA, i.a.

La partoprenantoj ricevis dosieron en cifereca versio de gravaj materialoj kaj dokumentoj kiel la Manifesto de Prago, Gvidlinioj pri informaga agado, tekstoj de Claude Piron kaj aliaj pri KEA kaj Esperanto en Kubo.

Temis pri la unua tiuspeca seminario lige al la publika laboro de KEA en la librofoiro, – unu el la plej grandaj kulturaj eventoj ĉiujare okazantaj en Havano –, kiu poste itineras tra aliaj grandaj urboj kiel Santiago de Cuba kaj Bayamo, kie ankaŭ deĵorus esperantistoj.

Laŭ oficialaj statistikoj, la librofoiron vizitas tradicie pli ol 100 mil kubanoj kaj eksterlandanoj dum 10 tagoj en Havano. KEA ekspozicis kiel eble plej reprezentan librostokon kaj varbas eblajn interesigojn por Fulma kurso la 3-an de marto en la havana sidejo; aldone, oni distribuis reklamilojn kun bazaj informoj kaj kontaktadreso por aliĝo al novaj kursoj ofertotaj de la asocio.



# Fabio kaj la “fama” radiostacio

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

*En decembro 2013 la brazila esperantisto kaj ĵurnalisto Fabio Monteiro vizitis Kubon kaj li esprimis sian intereson viziti la studiojn de Radio Havano Kubo por reciproka intervjuo, t.e por la radio kaj por lia projekto aŭdvida Globeto. Jen versio de intervjuo farita kune de Ariadna García kaj Maritza Gutiérrez. La kompleta intervjuo estas aŭskultebla ĉe [www.radiohc.cu/eo/audios](http://www.radiohc.cu/eo/audios)*



Intervjuo kun Fabio Monteiro

**A: Karaj geamikoj, hodiaŭ ni havas specialan invititon en la studio de Radio Havano, li mem sin prezentos.**

F: Saluton al ĉiuj esperantistoj. Mi nomiĝas Fabio kaj mi venis el Brazilo. Mi estas ĵurnalisto kaj nun mi vizitas Kubon kaj profitas la okazon por veni al la fama radiostacio de Kubo kaj mi feliĉas pro tio.

**A: Mi ŝatus ke vi iomete parolu pri la motivoj viziti Kubon ĉi jare?**

Do, la rakonto estus tre longa. Fakte mi ne venis nur al Kubo, mi estis en aliaj landoj, en Usono, Meksiko kaj nun Kubo. Estas multaj celoj fakte pro tiu vizito, sed ĝenerale mi havis specifan celon kaj dum tiu vojaĝo mi provas registri la Esperanto-movadon en tiuj landoj: en Usono mi partoprenis la landan kongreson, la Nordamerikan Someran Kursaron, en ĉiuj urboj kiujn mi vizitis mi trovis esperantistojn kaj parolis pri Esperanto, post tio mi iris al Meksiko partopreni la kongreson en tiu lando, poste mi venis al Kubo kaj iomete vojaĝis kaj laboris; kaj denove trovis multajn grupojn de esperantistoj kaj kiel ĵurnalisto mi filmas kaj registras kaj kiam mi revenu al Brazilo mi muntos tiujn raportojn; la nomo de mia projekto estas *Globeto* kaj spektblas en la reto ĉe *Youtube*, kaj vi povas serĉi kaj trovi mian paĝon kaj plurajn raportojn.

**A: Ankaŭ pri Esperanto en la portugala?**

F: Jes ankaŭ, pli malpli tio.

**A: Kion vi faris dum viaj vojaĝoj kaj kio okazos en 2014 en Brazilo?**

F: Tia demando estas bona, ĉar mi forgesis diri tion, mi ne nur registras la movadon kaj vojaĝon, sed ankaŭ provas paroli pri la venonta IJK, kiu hazarde okazos en mia urbo Fortaleza kaj mi provas prelegi, mi estas en la LKK kaj pro tio mi disvastigas tiujn informojn.

**A: Kiu estas via laboro en la LKK de la IJK?**

F: Mia laboro estas la loka agado, kiel ĵurnalisto mi havas bonajn rilatojn kun amaskomunikiloj en mia urbo, gazetoj, ĵurnaloj, televido, kaj pro tio mi povas kaj profitas disvastigi pri Esperanto en la urbo mem.

**A: Mi ŝatus ke vi parolu pri viaj spertoj ĝenerale kaj pri la vojaĝo en Kubo, ankaŭ pri la lando mem.**

F: Tre malfacila demando. Mi vere ŝatis la viziton, mi pensas ke Kubo estas unika lando, ĉi tie vi povas sperti aferojn kiujn vi vere ne trovos en aliaj lokoj, bonajn kaj malbonajn, kompreneble, sed mi vere ŝatis la landon, mi estis en Havano, Santiago, Contramaestre, Guantánamo, Santa Clara kaj mi ne havas multajn plendojn, mi rekomendas al aliaj esperantistoj kiuj volas koni Kubon, eĉ pere de Esperanto estas bonega ideo, se vi estas esperantisto vi devas koni ĝin. La etoso de la lando estas iom simila al la brazila etoso, la popolo estas tre simpatia kaj amikema, pro tio mi sentas min hejme, kaj pri la movado mi rimarkis ke la kvanto da homoj kiuj nomas sin esperantistoj estas multaj; la nombro de esperantistoj estas vere granda en ĉiu urbo kiun mi vizitis, mi kiel brazilano demandis min kial kubanoj volas lerni Esperanton, ĉar ili loĝas en insulo, ne estas multaj oportunoj por renkonti eksterlandanojn, do ili malfacile vojaĝas, ĝenerale ne estas interreto por korespondadi, do, mi faris tian demandon al mi mem: kial la kubanoj volas lerni, sed nekredeble multaj homoj interesiĝas.

**A: Krom tio, memoru pri la senco de Esperanto, la ideo flanko, estas amikemo, havi kvazaŭ familian rondon...**

F: Jes, mi pensas pri la idealisma flanko de Esperanto kaj pro tio la ĉefa kialo ŝajnas esti ke la homoj identiĝas kun tiu ideo de komu-

na lingvo kaj mi pensas ke tiu estas esenca motivo, komuna lingvo de la homaro...

**A: Do, ĝenerale estis interesa via sperto?**

F: Jes, tre interesa. Kelkfoje, homoj en kelkaj renkontiĝoj, ne havis tre altan nivelon kaj timas komuniki, konversacii, mi tion komprenas, ĉar vi loĝas en insulo kaj rimarkis ke kelkaj homoj iom timis paroli kun mi, sed tio ne estas granda problemo.

**M: Eble ankoraŭ demandi ion Fabio, mi ĝojas havi vin ĉi tie en la studio de Radio Havano Kubo. Do, sciante ke vi filmas mi ŝatus scii kiamaniere funkcias via laboro?**

F: La sama laboro kiun mi havas en Brazilo mi provas fari en Esperanto, dum la lastaj 5 jaroj mi laboris en televido kaj ankaŭ laboris en radio dum 10 jaroj kaj mi ege ŝatis tion, mi poste laboris denove en televido, sed mi konstatis ke mankas televidaj raportoj en Esperanto, mankas homoj kiuj faras tian laboron kaj pro tio mi decidis okupiĝi pri tio kaj provas plenumi tiun truon per mia laboro. Ankoraŭ mi estas en la komenco. Mi multon filmis dum miaj vojaĝoj kaj mi pensas aldoni inter 10 kaj 15 novajn materialojn en *Youtube*.

**M: Ĉu nur en Youtube? Ĉu ne eblas per DVD? Ĉar Youtube postulas tre bonan retkonekton...**

F: La homoj ĝenerale petas DVD-n, mi neniam faris, nuntempe mi ne havas alian manieron tion disvastigi, estus alia ebleco, sed almenaŭ en interreto Esperanto gajnas teritorion kaj mi revas pri esperanta televido...

**M: Jam antaŭe ekzistis Ĝangalo kiu provis havi la televidan kanalon kaj funkciis dum certa tempo, sed la merkato ne estas tiom granda kaj finance estas kosta afero, sed bonas ke estas tiuj klopodoj ĉe vi. Ĉu vi planas iri al Bonaero?**

F: Jes, mi planas. Espereble jes!

**M: Nu, Fabio, vi estas ĉiam bonvena en la studioj de Radio Havano. Ni havas propran retejon kaj klopodas disvastigi ĝin [www.radiohc.cu/eo](http://www.radiohc.cu/eo) do, vi povas ankaŭ kunlabori, ĉu?**

F: Jes, mi povas fari tion, mi ege ŝatas radion kaj mi ŝatus aldoni ke tiun laboron mi taksas tre grava kaj interesa maniero montri Esperanton al la ekstera mondo, ĉar ĝenerale la homoj pensas ke Esperanto estas teorio, lingvo kiu ne funkcias praktike kaj tiu laboro per radioelsendo kaj filmoj estas tre valida, ĉar la homoj vere vidas kaj konstatas ke la lingvo estas vivanta kaj vere funkcias kaj multaj homoj ĝuas Esperanton kiel veran aplikacion en siaj vivoj.

**A: Ĉu vi volas ankoraŭ sendi mesaĝon?**

F: Pli bonas saluti al ĉiuj, ĉar mi timas forgesi kelkajn nomojn, do, mi volas saluti al ĉiuj kiuj aŭdas min kaj vere rekomendi al ĉiuj vojaĝi al Kubo kaj ankaŭ al la aliaj landoj...

**A: Kaj ankaŭ al Brazilo en 2014, ĉu? Kiam okazos la IJK?**

F: Jes, la brazila IJK okazos de la 19-a de julio ĝis la 25-a, ĉar en la 26-a komenciĝos la UK en Bonaero, la ideo estas unue al la 70-a IJK kaj tuj poste al la UK. La temo de la kongreso estas ligita al la uzo de interreto kaj Esperanto.

**M: Fabio, denove mi dankas nome de nia eta skipo vian viziton al Radio Havano Kubo kaj al nia lando.**

Havano, la 28-an de decembro 2013

# Unesko-mesaĝo: Tago de la Gepatra Lingvo 2014



Estas jam tradicio en Esperantujo ke oni festas la tagon de la gepatra lingvo kaj atentis la deklarojn de Unesko prie. Ĉi jare ĝi aperis en Esperanto ankaŭ sur la retejo de tiu ĉi internacia organo de UN, kio sendube rekonas la utilecon de Esperanto kiel vehiklo por komunikado unu plian fojon per konkreta agado.

Pro ĝia graveco ni proponas ĝin al vi en traduko de Stefano Keller, UEA-estrarano pri eksteraj rilatoj: mesaĝo de s-ino Irina Bokova, Ĝenerala Direktoro de Unesko okaze de la Tago de la Gepatra Lingvo la 21-an de februaro.

De dek kvar jaroj Unesko kaj ĝiaj partneroj festas la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo. Ĉie en la mondo estas organizataj aktivaj, konferencoj, koncertoj, seminarioj, por prilumi la gravecon de la lingva diverseco kaj multlingvismo.

La protektado kaj la antaŭenigo de la gepatraj lingvoj estas bazaj antaŭkondiĉoj por tutmonda civitaneco kaj vera reciproka interkompreniĝo. La kompreno kaj parolkapablo en pluraj lingvoj kondukas al pli bona kompreno de la riĉeco de kulturaj interagoj en nia mondo. La agnosko de lokaj lingvoj permesas al pli da personoj sin esprimi kaj aktive partopreni en la komuna vivo. Tial Unesko faras ĉion eblan por progresigi la harmonian kunvivon de la 7000 lingvoj parolataj de la homaro.

En tiu ĉi jaro ni speciale direktas nian atenton al la temo lokaj lingvoj por tutmonda civitaneco: la scienco en la fokuso, por montri kiom lingvoj ebligas la aliron al scio, ties transdono kaj plureco. Male al onidiroj, la lokaj lingvoj estas perfekte kapablaj transdoni la plej modernajn sciencajn sciojn en matematiko, fiziko, teknologio ktp. Agnoski tiujn lingvojn signifas ankaŭ malfermi la pordon antaŭ granda kvanto da diversaj tradiciaj konoj sciencaj ofte ignorataj, kaj pliriĉigi niajn konojn.


Lokaj lingvoj estas la pli granda parto de la parolataj lingvoj de nia planedo en la kampo de

sciencoj. Ili estas ankaŭ la pli minacataj. Ekskludi lingvojn signifas senigi iliajn parolantojn je ilia fundamenta homa rajto pri akiro de sciencaj konoj.

Samtempe, la alproksimiĝo de popoloj en "mondan vilaĝon" eĉ pli necesigas la strebadojn por interkultura kompreno kaj dialogo. En la hodiaŭa mondo la normo estas uzo de minimume tri lingvoj, unu loka, unu pli vaste uzata kaj unu internacia lingvo por komuniki sur niveloj loka kaj tutmonda. Tiu diverseco lingva kaj kultura estas probable nia plej granda ŝanco por la futuro: por kreemo, novigo, inkluziveco. Ni ne malŝparu ĝin.

La Internacia Tago de la Gepatra Lingvo kontribuis jam de pli ol jardeko al la valorigo de la diversaj roloj de lingvoj en la formado de la pensmanieroj en larĝa senco, kaj al la konstruo de monda civitaneco, kie ĉiu havas la rimedojn por kontribui al la vivo kaj al la defioj de la socioj. Mi alvokas ĉiun membroŝtaton de Unesko, la Internacian Organizaĵon de la Francparolantaro, asociitan al ĉi tiu tago en 2014, la aktivulojn de la civila socio, la edukistojn, la kulturajn asociojn kaj la amaskomunikilojn fari sian maksimumon por daŭre subteni lingvan diversecon en la interesoj de paco kaj daŭrigebla evoluo.

(kompilo de la redakcio el  
Gazetara Komunikado n-ro 534 de UEA)



## Martí-Klubo en KEA

PEDRO FERNÁNDEZ RODRÍGUEZ

La 31-an de januaro en la Nacia Sidejo de nia asocio, grupo de havananoj fondis la Martí-Klubon "Patrio estas Homaro", aranĝo kiun prezidis sinjorino Mercedes Córdova Williams, kunordiganto de la Martí-Kluboj en municipo 10 de Octubre kaj Alberto Fernández-Calienes Barrios, prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio.

La ĉeestantoj spektis filmon pri la vivo de nia nacia heroo; poste okazis opini-interŝanĝo kaj Mercedes donacis ekzempleron de la revuo *Honda* organo de la Kultura Societo José Martí kune kun blanka rozo el papero, kiun ŝi mem faris laŭ la arto de paperfaldado.

La fonda membraro de la klubo estas 11 havanaj geesperantistoj, nome, Olga Lidia Barrios Cunningham, José Cárdenas Zuñiga, Albania Duthil Álvarez, Ariadna García Gutiérrez, Ismary Lezcano García, Sonia González Morales, Ángela Pedroso Cuesta kaj Cirilo Ramos Piñero.

La kluban estraron gvidas Maritza Gutiérrez González kiel prezidantino, Pedro Fernández Rodríguez, vicprezidanto kaj María Antonia Cartaya Martínez, sekreta-riino.

Nome de KEA oni disdonis memoraĵojn pri tiu grava evento al la ĉeestantoj. Ni invitas ĉiujn provincojn esplori la eblecon krei similajn Martí-klubojn en siaj respektivaj teritorioj kio estas maniero konkrete apliki la lingvon por disvastigi la riĉan kaj belan agadon de José Martí, kies pensado kaj arta agado travivas la tempon kaj restas tre aktuala por ĉiuj kubanoj.

## Radiostacio *Papilio*: dum KERo 2014 kaj el Viñales al la mondo

ARIADNA GARCÍA GUTIÉRREZ

Same kiel dum la antaŭaj Kubaj Esperanto-Renkontiĝoj (KERo), ekfunkcios dum la ĉijara, en Pinar del Río, la radiostacio *Papilio*, kiu proponas al vi pasintajn kaj aktualajn informojn pri la E-okazaĵoj tra la mondo kaj en Kubo. Krome vi povos ekscii pri gravaj elstaruloj en la E-movado, same pri internacia muziko kaj kantistoj. Krome se vi emas diskonigi viajn programerojn dum KERo, pere de la radiostacio *Papilio* vi havos tiun eblecon ĉiam en la tagmezoj. Surprizojn ankaŭ atendu! Do, ne perdu la okazon ĝui la ĉijaran programon de la radiostacio *Papilio* kiu alportos al nia aranĝo freŝan venton ekde ĉiuj mondopartoj, kulturon de paco kaj sukcesdezirojn.

# Centjariĝoj (I)

JUAN R. RODRÍGUEZ GÓMEZ

*Sub tiu-ĉi rubriko, iom post iom, laŭokaze, mi aperigos la koncernajn faktojn de cent jaroj antaŭe, sed nur per notetoj (kaj bildoj, se eblas). Estontece, ĉiu fakto (eĉ detaloj el ili) estos temo de sufiĉe ampleksa artikolo, kiel parto de la serio Eroj de nia Historio.*

**1913.** Tiu-ĉi jaro estas plenplena de interesaj aferoj de nia historio. Jen resumo:

- En januaro aperas la n-ro 1 (jaro IV) de *Cuba Esperantista* (oficiala organo de Socio Kuba por la propagando de Esperanto, fondita la 1-an de januaro 2010), ĉikaze okpaĝa eldono, kies titoloj estas la jenaj: “El informe anual” (La jara informo), pp. 1-4; “Los acuerdos de la Asamblea” (La interkonsentoj de la Asembleo), pp. 4-5; “Nuestra reunión anual” (Nia jara kunsido), p. 5; “El Esperanto en 1912” (Eo en 1912), pp. 6-7; “El Esperanto en Cuba” (Eo en Kubo), p. 7; “Progreso de Esperanto en

Kubo: Resumo por la alilandaj gazetoj”, p. 7; kaj, en la oka paĝo, “Avisos importantes” (Gravaj avizoj), “Novaj gazetoj”, “Parkurbo Esperanto” kaj “Bibliografio”.

- La elektita Estraro por la jaro 1913 (9-a interkonsento de la Asembleo) konsistas el pluraj gravuloj en la Historio de Esperanto en Kubo: Federico Grande Rossi (prezidanto), Eduardo F. Rodríguez (vicprezidanto), Antonio Alemán Ruiz (sekretario), Pedro Martínez de Villa (vicsekretario), Joaquín Martínez de Villa (kasisto), Andrés Ma. Oli-va Cuevas (vickasisto) kaj, kiel konsilantoj,

2) UEA kreis Subkomitaton por Nordameriko, konsistanta el kvin membroj: D. E. Parrish (Los Angeles), E. Reed (Washington), C. H. Fessenden (Boston), A. Alemán Ruiz (La Habana) kaj E. Wilson (Québec).

3) La Centra Oficejo de SKPE registras 623 membrojn, el 23 lokoj de la lando: Encrucijada, La Habana, Cascajal, Matanzas, Quemado de Güines, Báez, Santa Clara, Central San José, El Gabriel, Guantánamo, Limonar, Camagüey, Trinidad, Rodas, Guanabacoa, Preston, Cabaiguán, San Nicolás, Tuinicú, Nuevitas, Cárdenas, Sagua la Grande kaj Caibarién.

- La kvina interkonsento de la januara Asembleo esprimas la ideon danki la Direktoron de la revuo *Bohemia*, ĉar li akceptis inkluzivigi monatan rubrikon pri Esperanto dum 1912. Sekve, parto el tiu serio publikigita en la n-ro 49, dimanĉo la 8-an de decembro de tiu jaro:



Ricardo Vicente, Rafael G. Crespo, Antonio M. de Ayala, Arturo E. Haynes, Luis E. Fernández y José F. Fernández.

- Aliajn gravajn aferojn publikigas la n-ro 2-3 (jaro IV), februaro-marto, de *Cuba Esperantista*, dekpaĝa eldono, konsistanta el 14 titoloj kaj kelkaj notoj. Inter la informoj, menciendas tri:

1) Antonio Alemán Ruiz kaj Joaquín Martínez de Villa estis elektitaj, respektive, Delegito kaj Vicdelegito de UEA.

Noto: Tiu serio de artikoloj daŭris dum 1913. La Arkivo pri Historio de Eo en Kubo havas ekzemplerojn de aŭgusto, novembro kaj decembro.

Mia kontribuo al  
Kuba Esperanto-Asocio

MIGUEL ÁNGEL GONZÁLEZ ALFONSO,  
Havano



★ Mi naskiĝis la 12-an de aprilo 1967 en Havano, Kubo ★ Mi konatiĝis kun la internacia lingvo Esperanto en 1988 kaj tuj mi restis ravita de ĝi, do mi fariĝis aktivo de Kuba Esperanto-Asocio kaj mi lernis Esperanton pasie; de tiam mi estas senĉesa propagandisto de Esperanto kaj por Esperanto ★ Mi instruas la lingvon ekde la jaro 1990 kaj partoprenas aktive en la vivo de la KEA kaj nuntempe estas komisiito pri instruado de Esperanto en Kubo kaj ILEI-Sekciestro de KEA ★

# Retrokurado en Esperantujo: kio ĝi estas?

JAVIER RAMOS NISTAL



*Retrokurado en Esperantujo*

La projekto RETRORUNNINGCUBA ekaperas en Havano la 23-an de julio 2011, kiam entuziasmaj atletoj grupiĝas en la sportejo CVD José Martí en municipo Plaza, por okazigi la unuan oficialan eventon de Retrokurado en Kubo.

Retrokurado estas la arto kuri malantaŭen kaj en la mondo oni praktikas ĝin ekde la 19-a jarcento; la unuaj rekordoj estis oficiale registritaj en 1883. Tiu praktiko etendiĝis tre rapide tra Eŭropo, Azio kaj Ameriko, kvankam nur la sekvan jarcenton ĝi eniris Kubon. Ĝiaj praktikantoj kaj fondintoj sentas grandan plezuron pro tio ke nia insuleto troviĝas en la monda mapo de tiuj landoj kiuj praktikas tiun specialan sporton.

La 26-an de oktobro 2013 oni organizis la 1-an Nacian Konkurdon de Retrokurado en Kubo. Ĝin partoprenis 60 reprezentantoj el 7 kubaj provincoj kaj 4 landoj.

En la grupo ankaŭ estis 3 atletoj, membroj de la klubo de RETROKURADO de KEA, grupo kreita kadre de KERo 2013, kiu nun havas 20 membrojn en kelkaj provincoj de la lando.

Notindas la partopreno de: Ismary Lezcano García, Alberto Rodríguez Pineda kaj Javier Ramos Nistal, kiuj plibonigis siajn persojnajn rekordojn de antaŭaj konkuradoj en la distanco de 100 metroj kaj ankaŭ kuris distancon de 1 km; Javier eĉ atingis la 2-an plej bonan tempon en 100 m, nur post la nacia rekordisto de la distanco.

Gratulojn al ĉiuj partoprenantoj, ni rekomendas al ĉiuj aliĝi al la klubo de Retrokurado de KEA.

## Arto-Festivalo en Havano

PEDRO FERNÁNDEZ RODRÍGUEZ

La lastan sabaton de novembro 2013 la Provinca Filio de KEA en Havano okazigis Kulturalan Festivalon, kie la esperantistoj utiligis la lingvon precize por kulturklerigaj temoj. Estis konkurso pri rakontoj kaj poemoj. Membris la ĵurion Marta Alonso Gutiérrez kaj Pedro Fernández Rodríguez, kiuj aljuĝis la jenajn premiojn:

### En la branĉo rakonto:

Partoprenis: Carlos Ramón Morales kun la verko "Vivu Esperanto".  
Dua loko: Sonia González Morales "Songô".  
Unua loko: Juan Amador Benavides "La atenco".

### Branĉo poemo:

Partoprenis: Félix Pablo Viltres "Mia bela animo".  
Olga Lidia Barrios Cunningham "Iluzio"  
Cirilo Ramos Piñero "Pluvema vespero".

Mencioj: Deyse Ríos Montalvo "Mia Havano".  
Ismary Lezcano García "Kelkfoje nesufiĉas"

Tria loko: Ismary Lezcano García "Ami vin estas".

Dua loko: Ismary Lezcano García "Ŝuldo".

Unua loko: Cirilo Ramos Piñero "Kuirejo hejma".

Okazis ankaŭ konkurseto pri kokteloj. Tri membroj de la klubo "La Saĝa Aĝo", kiu grupigas kelkajn triaĝulojn, miksis koktelojn kaj klarigis la proceduron kaj la ingrediencojn, kiujn ili uzis.

Olga Bachiller, "Nova koktelo el mento"; Deyse Ríos, "Likvoro el ananaso" kaj Miriam Maraŝón, "Likvoro el papajo". Ĉiuj gustumis la koktelojn kaj taksis ilin tre bonaj. Poste estis deklamado kaj amatora magiisto regalis nin per sia arto. La brazilano Fabio Monteiro alparolis la publikon kaj multe fotis la ĉeestantaron. Ni gratulas ĉiujn gajnintojn kaj invitas ilin partopreni en la venonta kultura festivalo.

## Terminologio en Esperanto: grava esplorkampo

ARIADNA GARCÍA GUTIÉRREZ\*

Okaze de KER-o 2012 mi prelegis pri tiu ĉi temo kiu fariĝas pli kaj pli mia amata ĉevaleto. Fakte, la informa mondo malfermas la pordojn al novaj pensmanieroj kaj vidpunktoj. Ju pli oni konas, des pli libera kaj forta oni povas esti. La esplorado pri Informaj Sciencoj diskonigas ĝiajn agadkampojn, kie la koncernaj profesiuloj povas specialigi kaj labori. Unu el tiuj estas Terminologio.

Kial paroli pri terminoj, pri terminologio? Kio ĝi estas kaj kiel rilatiĝas kun Esperanto? Gvidi kaj kontroli la novajn terminojn aperantajn en la diversaj branĉoj de la sciencoj konsistigas la ĉefan rolon de terminologiistoj. Ĉu Esperanto evoluis nur ĉar ĝi estas esprimilo prefere por poeziaĵoj, destinita por priskribi sentojn kaj emociojn, kaj malpli taŭga por komuniki teknikajn precizaĵojn? Fakte ne, eĉ male. La lingva strukturo de Esperanto, ĝia sistemeco kaj relativa racieco, legitimas ĝin kiel speciale taŭgan por sciencoj kaj teknikaj, fakaj celoj.

Do, mi revenas al la antaŭa demando: kio estas terminologio? Temas pri aplikata disciplino kiu baziĝas sur la kreado kaj produktado de novaj terminoj por plifaciligi la kompreniĝon, kun la ĉefaj celoj reprezenti kaj transdoni novajn terminojn al la diversaj branĉoj de la sciencoj.

Kompreneble, la temo estas vasta kaj ligiĝas al aliaj demandoj pri lingvistiko, leksikografio kaj aliaj fakaj konceptoj. Pri ĝia nuna situacio, kiel ŝanĝi ĝin kaj la rolo de esperantistoj, ni povus plu paroli en estontaj etaj artikoloj, ĉar ĝi estas esplorinda kaj necesa laboro.

\* Membro de la terminologia komisiono. UEA

Malferme

Mark Fettes

# Por fariĝi amasmovado

Vi trovas en viaj manoj, aŭ sur via ekrano, renovigitan revuon. Nia nova redaktoro energie jetis sin en la laboron por rekoncepti kaj relanĉi ĉi tiun gvidan velsipon de la Esperanta gazetaro. Nun li atendas viajn reagojn, konsilojn kaj kunlaboron en la pluvelado.

Mi persone tre ĝojas pro la entuziasmo kaj ambicio de la nova redaktoro, kiu estas kvazaŭ aldona estrarano de UEA, kiu helpas doni direkton kaj agordi la tonon de la tuta asocio. Aliflanke necesas rekoncepti, ke la renovigo de la revuo estas nur unu paŝo en tiu pli vasta renovigo, kiun celas la nuna estraro.

Enkonduke al la nova jaro kaj prilume al la kovrila temo, mi ŝatus dividi kun vi kelkajn pensojn pri tiu renovigo. Pli ĝuste, pri nur du ŝlosilaj demandoj: kia movado ni fakte estas? Kaj kiel evolui al movado, kiu povas ŝanĝi la mondon?

## Plenumo de deziroj

Kiu movadano ne devas foje respondi al la demando, kiom da homoj fakte parolas la lingvon? Kaj oni parolas jen pri dekmiloj, jen pri centmiloj, eĉ foje pri milionoj da esperantistoj, kvankam ni ĉiuj scias, ke en la lastaj jaroj UEA apenaŭ sukcesas kunskrapi kvinmilion da individuaj membroj.

Evidente gravas la difinoj. La KER-ekzamenoj, ekzemple, liveras al ni utilan difinaron, pri lingvokapabloj en niveloj A1 ĝis C2. Ĝis nun la ekzamenojn trapasis, en unu nivelo aŭ alia, ĉirkaŭ 1 400 homoj. Estus bele, se ni povus kreskigi tiun nombron al 14 000, aŭ eĉ al 140 000, ĉar tio komencus doni pli kredindan bildon pri la amplekso de la lingvokomunumo. Kaj tia dokumentado ja apartenas al niaj prioritatoj.

Sed ne tiel, aŭ ne nur tiel, ni ekhavos amasmovadon. Por tio necesas plivastigi nian komprenon de esperantisteco, por inkluzivi ankaŭ niajn samideanojn. Kiel foje skribis Helmut Welger, ni pli bone komprenos Esperanton se ni imagos ĝin, ne kiel lingvon kun interna ideo, sed kiel ideon kun interna lingvo. Kaj tiu ideo – de homa digno, homa solidareco,

egaleca kaj sincera interhoma komunikado en tutmonda skalo – estas tio, kio povas tuŝi la koron de milionoj.

De Kees Ruig, nederlanda fakulo pri enmerkatingo, mi lastatempe ricevis la konsilon: aĉetantoj ne aĉetas produkton, ili aĉetas dezirplenumigon. Do, necesas konscii, ke ni vendas ne nur lingvon. Ni vendas unue, kaj ĉefe, homaranecon.

## Paroli kaj aŭskulti

Per homaraneco mi celas la senton, ke oni mem aktive partoprenas en iuspeca tutmonda kulturo – ne simple kiel konsumanto aŭ kliento, sed kiel kunkonstruanto. Tiu kulturo mem, do, estas alia ol la kulturo de la grandaj kompanioj kaj traktatoj. Oni povus nomi ĝin civitana kulturo aŭ, kiel estas proponata en la ĉi-numera

Nia renovigita revuo proponas daŭran inviton: evoluu kun ni!

ĉefraporto, kulturo de la tria sektoro. Mia elekto de "hoharaneca" omaĝas la pensaron de Zamenhof, al kiu ni ŝuldas pioniran laboron pri ĝia etika bazo.

Kiom da homoj en nia nuntempa mondo sentas ligitecon al tiu homaraneca kulturo? Certe temas pri minoritato: ĉu 2%? 5%? Tutmonde, tamen, temas tucerte pri dekoj da milionoj. Tiuj homoj estas niaj aliancanoj – niaj samideanoj. Multaj el ili verŝajne neniam aŭdis pri Esperanto. Ili estus tamen pretaj subteni ĝin,



Mark Fettes estas prezidanto de UEA kaj profesoro pri edukado en la universitato Simon Fraser (Vankuvero, Kanado). Esperantisto de la jaro 2013.

ĉar ĝi kongruas kun iliaj valoroj, ilia mondbildo.

Por fariĝi amasmovado, ni devos do lerni paroli kun tiuj homoj. Tio signifas ankaŭ lerni aŭskulti ilin. Ni alportas homaranecan rigardon al la lingva sfero; ni elserĉu kaj akceptu homaranecajn kontribuojn en aliaj sferoj. La fakto, ke UEA jam de 65 jaroj emfazas la ŝlosilan gravecon de la homaj rajtoj en nia laboro por Esperanto, estas modelo de tia evoluo; sed ni ne imagu, ke tie jam finiĝas niaj devoj.

## Ĉu la nepoj nin benos?

Tiel tekstas, iom provoke, la unua parto de la kongresa temo de la venonta UK en Bonaero. Pri ĝi vi povos legi pli amplekse alipaĝe. Ĉi tie sufiĉas konstati, ke la temo traktas ĝuste la kampon, kiun mi aludis ĉi tie.

Kial ne ekkoncepti nin kiel movadon por daŭripova evoluo? Aŭ pli bone, kiel edukan movadon por daŭripova mondo? Kiel movado, kies edukado okazas ĉe la radikoj de la homa identeco, en tiu profunde intima, emocia, intuicia nivelo de la lingvokono?

Esperanto: lingvo por daŭripova mondo. Jen slogano por ni en ĉi tiu nova jaro. Slogano, kiu postulas laboron ankaŭ de nia flanko, por kompreni ĝian amplekson, ĝiajn implicojn.

Malgraŭ la saĝo de Zamenhof, ne sufiĉas pacienco elteni. Necesas ankaŭ dinamike evolui. Nia renovigita revuo proponas daŭran inviton: evoluu kun ni!

# Nicolás Guillén

## la nacia poeto

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Nicolás Guillén speciale ŝatis la portugalan vorton *saudade*, kiun li lernis en Brazilo, ĉar li spertis ĝin proprakarne. Ĝi signifas nostalgion, kaj la poeto – dum siaj oftaj vojaĝoj tra la mondo – ĉiam suferis nostalgion pro la naskiĝlando, deprimita de enormaj deziroj reveni al Kubo.

Naskiĝinte en la urbo Camagüey la 10-an de julio 1902, Guillén, kvankam regate de sopiro vojaĝi tra la mondo, estis, esence, provinca homo.

Lia tuta vivo estis markita pro la signo de tipografio. Inter la jaro 1918 kaj 1919 li laboris kiel tipografo en la metiejo aneksa al la ĵurnalo *El Nacional* kaj ricevis senpagajn lecionojn en vespera akademio. Sekvajare, en 1920 li finis sian gimnazian studadon en Camagüey kaj enskribiĝis en la Havana Universitato por studi juron, sed pro financaj kaŭzoj li devis reiri al sia loĝloko, Camagüey, kie li publikigis siajn unuajn versojn en la revuo *Gráfica Camagüey*.

En la jaro 1921 li reiris al Havano pro la bezono atingi siajn celojn, li klopodis rekomenci sian universitatan studadon, sed definitive devis rezigni pri tio kaj revenis al Camagüey, jam en 1922 kiam decidis arigi la poemojn de sia libro *Cerebro y corazón* publikigita nur en la jaro 1964.

La jaro 1930 markis la aperon de lia poste fama poemlibro *Motivos de son* kies titolo devenas el soneo, muzika ĝenro evoluanta dum la 20-aj jaroj de la pasinta jarcento, atinginta sian apogon en la 30-aj jaroj kiam jam ekzistis pluraj komponistoj kun originalaj muzikaĵoj ege populariĝintaj.

Laŭ propraj paroloj de Guillén, kiam li estis infano dekjara, li jam aŭdis tian sonean ritmon kaj poste estis ege influita de ĝi pro la societaj baloj de la 20-aj jaroj kiam tre famiĝis diversaj grupoj kiel la Septeto Habanero kaj Matamoros. En tia sonea etoso naskiĝis la libro *Motivos de son*. Pri ĝi li mem esprimis en 1945: "...la naskiĝo de tiaj poemoj ligitas al sonĝa sperto...". Tiamaniere li klarigis kiel dum tuta nokto vortoj flugis en lian kapon kaj li ne povis eskapi el tia profunda kaj prema deziro esprimi sin, tiel ke dum tuta tago li verkis senhalte. La libro konsistigis fortan literaturan okazaĵon ne nur pro la ritmo sonea, sed ankaŭ pro la diversaj tipoj, situacioj kaj esprimoj prezentitaj, devenintaj el la reala vivo de familiaj domoj el malriĉaj kvartaloj de la ĉefurbo. Satiro, humuro, ironio, mokado estas rimedoj eluzitaj de la poeto por prezenti plej diversajn vivmanierojn kaj fenomenojn de la surstrata enurba vivo. Per tiu libro Guillén sukcesis alporti originalan esprimformon poezian tipe kuban, kaj krome, loki la nigrulon kaj ties problemojn en la literatura kampo kiel maniero doni signifon al la negra ĉeesto en la kuba socio. Poste aperis pliaj motivoj kaj novaj soneoj kongruaj kun la sociaj okazaĵoj post fervora revolucia periodo kiu fiaskis en la sendependigaj celoj dum la tridekaj jaroj.

Tiu ĉi poemo apartenas al libro publikigita en 1947 sub la titolo *El son entero*, verko per kiu evidentiĝas funda maturiĝo kaj rego de la poeto en la ritmo kaj strukturo de tia muzika ĝenro kiun li scipovis rekrei kiel neniu alia poeto nialande.

*Sone' de l' matura amo*  
*Plena soneo*  
*Sone' de l' futur' aperta*  
*Plena soneo*  
*De la piedo sur la mur'*  
*Plena soneo...*

.....  
*Lulkanto por veki negreton*

Poemo de Nicolás Guillén  
 Trad. Maritza Gutiérrez González

.....

*Kantante kolombo pasas:*  
*Ek, mia negro,*  
*La suno ardas!*

*Neniu dormas*  
*Nek hejme staras*  
*Nek krokodilo*  
*Nek la kolombo*  
*Nek la serpento*  
*Nek la palumbo*  
*Kokos', kakao*  
*Korno, rumŝaŭmo*  
*Ek, mia negro*  
*La suno ardas*

*Vi, venu neĉjo*  
*Kun via negrino*  
*Vento kun vent'*  
*La suno ardas.*  
*Vidu la homojn*  
*Vokante pasas;*  
*Hom' sur la strato*  
*Homoj surplacas*  
*Restas neniu*  
*Hejme kuŝanta*  
*Kokos', kakao*  
*Korno, rumŝaŭmo*  
*Ek, mia negro*  
*La suno ardas*

*Nigrul', negreto*  
*Rosin' kaj pruno*  
*Vekiĝu, venu*  
*Ardas la suno*

*Diru plenveka,*  
*Diru kio okazas*  
*Brule la mastro*  
*Ene en la flamo*  
*Neniu dormas*  
*Nek hejme staras*  
*Kokos', kakao*  
*Korno, rumŝaŭmo*  
*Ek, mia negro*  
*La suno ardas!*

Havano, 15.01.2014



Kaj sekve li fermas ĝin per ripeto de la oka strofo:

*Elprenu ĝin gitarulo*  
*De l' alkohol' ĝin purigu*  
*Kaj per la gitar' aŭdigu*  
*Plenan soneon.*

Nicolas Guillén fariĝis voĉo de la kuba popolo, li vojaĝis senĉese tra ĉiuj kontinentoj, sed ĉiam nostalgio akompanis lin dum siaj vojaĝoj. La 16-an de julio 1989 je la aĝo 87-a, forpasis Nicolás Guillén en Havano. Jam tiam lia voĉo estis rekonata kiel la Nacia Poeto, tiu kies du avoj, la nigrulo kaj blankulo, ĉiam influis lian tutan vivon per tiu ritmo unika de siaj poemoj.

## KONCIZE EL...

**PINAR DEL RÍO** | La 22-an de decembro 2013 diplomigis junuloj de la radioklubo en Pinar del Río; oni transdonis atestilojn pro trapaso de la baza kurso de Esperanto, kiun ili ĉeestis dum la lastaj monatoj. Tiu ĉi kurso celis revivigi la esperantistan movadon en Pinar del Río kiun oni kredis perdita, sed tiuj junuloj pruvis ke Esperanto daŭre vivos kaj kreskos la kvanto da parolantoj en tiu provinco.

Dum la aranĝo kaj transdonado de atestiloj oni decidis krei Esperanto-Klubon en la provinco kun la celo unuigi pli da esperantistoj al nia movado.

Jam ni antaŭeniras kaj memdecidis lerni tiun mirindan lingvon Esperanto. Kune kun la apogo de la radioklubo kaj KEA ni esperas povi transdoni tiujn konitaĵojn kiujn ni ricevis al ĉiu intereso kaj iam plezure aŭdi surstrate "Saluton!"

**CIENFUEGOS** | Alina Zuaznabal raportas pri nova E-rondo, fondita la 1-an de februaro 2014. Ili baptis ĝin per la nomo *Verda Festo*. Ili kantis la esperantistan himnon; sed unue ili legis por kompreni ĝian mesaĝon. Poste ili aŭskultis du versiojn kaj sekve korse kantis ĝin. Tiam ili legis kelkajn artikolojn de la revuo *Kontakto*, rakontis anekdotojn kaj ĉiuj klopodis paroli preskaŭ ĉion en Esperanto.

**GRANMA** | Nacia evento de Granma Esperanto-Filio. Poŝtkesto 48 Bayamo 1, Granma, Kubo. Retadreso: [esperanto@crisol.cult.cu](mailto:esperanto@crisol.cult.cu) / Telefono: +53 23 42 9136 / Kampadejo La Sierrita, Bartolomé Masó, Granma. Dato: 22-25 majo 2014. Partoprenu!



*E-lernantoj de la radioklubo en Pinar del Río*



*E-rondo, Verda Festo, en Cienfuegos*

Kuba Esperanto-Asocio  
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba  
+53 7 640 4484  
[info@esperanto.cu](mailto:info@esperanto.cu)  
[www.esperanto.cult.cu](http://www.esperanto.cult.cu)

esperanto  
CUBA 

**KER**   
**Kuba Esperanto-Renkontiĝo**  
Kampadejo Dos Hermanas  
Viñales, Pinar del Río  
12-16 marto 2014



**RADIO HAVANO KUBO**  
Kurtondaj kaj retaj elsendoj  
[www.radiohc.cu/eo](http://www.radiohc.cu/eo)



**esperanto.cu** estas trimonata eldonaĵo sendita al komitatanoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. Reta versio elŝuteblas de nia retejo [www.esperanto.cult.cu](http://www.esperanto.cult.cu). **Redaktis:** Alberto F. Calienes, Maritza Gutiérrez kaj Javier Ramos. **Enpaĝigis:** Alberto F. Calienes kaj Y. Mayol.

esperanto  
CUBA 